

Anoncoj

ESF matches donations to E-USA

The Esperantic Studies Foundation (ESF) has agreed to extend its matching program for donations to E-USA through 2023, up to a total of \$5000 for the year.




When you donate to E-USA through ESF, your donation will be matched dollar for dollar. The matching funds are intended to be used to provide direct benefit to E-USA members and in the past have been crucial to the success of the Usona Bona Film-Festivalo and to production of the film version of the new play *1910* that was performed onstage at the UK in Montreal in August 2022. Please donate to help us continue to fund Esperanto activities and programs in the United States.

Donate today! <https://www.paypal.com/donate/?hosted_button_id=7PDRAZGYEG9E>

Usona Esperantisto en sociaj retoj

Ĉu vi scias, ke Esperanto-USA aktivas de jaroj en sociaj retoj? Ni publikigas ĉiujn niajn anoncojn kaj artikolojn per pluraj komunikiloj. Per tiuj oni povas ricevi novaĵojn tuj, kiam ili unue eldoniĝas, kaj facile reagi aŭ dividi kun amikoj:



- **Facebook-paĝo** <<https://www.facebook.com/esperantousa>>
- **Facebook-grupo** <<https://www.facebook.com/groups/usono>>
- **Reddit** <<https://esperantousa.reddit.com>>
- **Mastodon** <<https://esperanto.masto.host/@esperantousa>>
- **Twitter** <<https://twitter.com/esperantousa>>

Cetere, ni disponigas **plurajn abonfluojn (RSS)**

<<https://bulteno.esperanto-usa.org/rss/>>.

Ĉiuj el la supraj komunikiloj ricevas la samajn afiŝojn, do ne gravas, kiun vi uzas; ĉiukaze vi ricevos ĉiujn novaĵojn.

NASK-2023

NASK—the US Summer Esperanto Program—is open for enrollment for the 2023 courses.



In addition to two online spring courses taught by Rafa Nogueras and Hoss Firooznia, the summer program will offer three levels of instruction in a 5-day residential format:

- Post-Beginner with Brian Harmon
- Intermediate with Rafa Nogueras
- Advanced with Duncan Charters

Dates of instruction will be July 3–7, with student arrival on Sunday, July 2, and departure on Saturday, July 8.

Course descriptions, registration information, and payment options are all available at the NASK website.



NASK – la Usona Somera Esperanto-Kursaro – estas malfermita por aliĝo por la programo de 2023.

Aldone al du retaj kursoj en la printempo instruotaj de Rafa NOGUERAS kaj Hoss FIROOZNIA, la ĉeesta somera programo prezentos tri nivelojn de instruado en kvin tagoj:

- Post-baza kun Brian HARMON
- Meza kun Rafa NOGUERAS
- Supera kun Duncan CHARTERS

Lecionoj okazos 3–7 Julio. Lernantoj alvenos dimanĉon, la 2-an de Julio, kaj foriros sabaton, la 8-an de Julio.

Kurs-priskriboj, informo pri aliĝado, kaj elektoj por pago estas haveblaj ĉe la NASK-retejo.

Forpasis Edwin DE KOCK

Edwin DE KOCK forpasis la 14-an de Decembro, 2022, en Edinburgo, Teksaso, post mallonga malsano. Li estis membro de Esperanto-USA, honora membro de UEA, kaj membro de la Akademio de Esperanto de 1973 ĝis 2007. En 2000 li fariĝis usona civitano kaj ekloĝis en Edinburgo. En 2005 li estis honora gasto ĉe la Landa Kongreso de E-USA en Aŭstino.



Naskita la 9-an de Marto, 1930 en Sud-Afriko, de Kock estis poeto en la angla, la afrikansa, kaj Esperanto. Li estis plej konata en Esperantujo pro liaj poezio kaj verkoj esperantologiaj.

Pliaj detaloj pri Edwin DE KOCK kaj liaj verkoj troviĝas en la **esperantlingva Vikipedio**

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Edwin_de_Kock>.

Venu al la Landa Kongreso!

La ĉi-jara Landa Kongreso de Esperanto-USA okazos ĉe la Universitato de William Peace en Raleigh, Norda Karolino de vendredo, la 7-a



de Julio (vespere) ĝis lundo la 10-a (tagmeze). Ni planas ekscitan kongreson plenplenan de muziko, ekskursoj, aktivadoj, kaj interesaj prelegoj.

Se vi volas ludi muzikon, prezenti alian kreaĵon, prelegi, aŭ estri alispecan programon dum la Kongreso, bonvolu diri al ni pri viaj ideoj per la **jena Google-formularo** <<https://forms.gle/MdYqE38TPkAd42sU8>>.

Veni al tia kongreso estas bonega maniero uzi la lingvon kaj partopreni en la kulturo kaj komunumo de la lingvo. Vizitu la kongresan retejon por pli da informo, kaj revenu ofte por ĝisdatigoj!

Se vi havas demandojn, bonvolu sendi retmesaĝon al gabisaga@gmail.com.

— Vince ALLISON <vinceallison@gmail.com> & Gary BISAGA <gabisaga@gmail.com>

Belarta rikolto 2022

Lastatempe aperis la libro *Belarta rikolto 2022* kun premiitaj verkoj de la 73-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA, anoncitaj en la 107-a Universala Kongreso (UK) en Montrealo. La libro estas parto de la eldona agado de UEA kunlabore kun la eldonejo Mondial el Novjorko. Kun 121 paĝoj ĝi enhavas poezion, prozon, mikronovelojn, teatraĵojn, monologojn/skeĉojn, eseojn kaj kantotekstojn. Eblas ĝin aĉeti de **Mondial** <<https://square.link/u/HLCNgKRt>>, **Amazon** <<https://amzn.to/3yAst6h>>, kaj **UEA** <<https://katalogo.uea.org?inf=8614>>. Aperas en ĝi interalie la verkoj de usonanoj Brandon SOWERS kaj Jorge Rafael NOGUERAS.



Laŭ la regularo de la Belartaj Konkursoj la premiitaj verkoj estas aperigitaj en eldonaĵo subtenata de UEA. Ekde 2013 Mondial publikigas ilin sub la titolo *Belarta rikolto*. Tio signifas, ke la *Belarta rikolto 2022* estas la deka en la serio.

Korespondi deziras

- Prezidanto de Esperanto-klubo en Tanzanio serĉas korespondantojn por siaj gelernantoj. Kontaktu al **Charles Hiza**, chakhiza951@gmail.com.



- Mia nomo estas François Monshet Nhy Wa Dana. Mi loĝas en la Demokratia Respubliko Kongo, kaj havas 69 jarojn. Mi volus korespondi kun usonanoj. Trovu min ĉe **Facebook** <<https://facebook.com/profile.php?id=100080653720577>>, kaj en


Telegram kaj WhatsApp (n-ro
243846847158).

Book of Guests in Esperanto

Clarence BICKNELL

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell>

(1842–1918) estis brita pastro, botanikisto, arĥeologo, aŭtoro, kaj frua esperantisto. Li eklernis ĝin jam en 1897, verkis kaj tradukis en la lingvo, kaj ĉeestis la unuan Universalan Kongreson en Bolonjo en 1905, kie li fariĝis membro



de la lingvokomitato.

Inter liaj verkoj estis la *Libro de gastoj*, kiujn li faris por gastoj ĉe sia alpa somerdomo inter 1906 – 1918. Ĝi enhavas pli ol cent enskribojn. Ĉiu konsistas el mallonga priskribo de la gasto kun bele ilustritaj inicialoj kaj pentraĵo de alpa floro. Danke al la laboro de la Asocio Clarence Bicknell, la libro nun haveblas la unuan fojon al la publiko.

Pli da informo troveblas ĉe **retejo dediĉita al Bicknell** <<http://clarencebicknell.com/book-of-guests-in-esperanto/>>, kaj la libro estas nun aĉetebla ĉe **Amazon** <<https://amzn.to/3Ly8AVa>>.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

For brevity, only expenditures of \$10 or greater are listed. Contact the Director of the CO at info@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our **Restricted Funds** <https://bit.ly/3lzL1LK> are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2022-12-01	ENDICIA	111	Bulteno - Print & Post	UE 2022:5
2022-12-01	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2022-12-02	RAND PRINTING	206	Bulteno - Print & Post	UE 2022:5
2022-12-06	Hamme, Mark	269	E-USA kontoj	money sent to Mark
2022-12-09	ENDICIA	33	Member Mailing Expenses	stamps for paper renewals
2022-12-13	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2022-12-13	Federal & State Payroll Taxes	709	Salaries	Employee taxes
2022-12-13	HARRISWB	1722	Salaries	payroll
2022-12-14	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2022-12-14	RAND PRINTING	35	Member Mailing Expenses	Membership sign-up forms
2022-12-16	ADP	59	Payroll Fees	fees
2022-12-16	ENDICIA	15	Member Mailing Expenses	stamp sheets for memberlist
2022-12-16	ENDICIA	48	Bulteno - Print & Post	stampsheets for newsletter
2022-12-26	UEA-V	4000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 3736.94 EUR
2022-12-28	STAPLES	105	Member Mailing Expenses	Envelopes for paper memberlist
2022-12-29	ENDICIA	295	Member Mailing Expenses	stamps for memberlist
2022-12-31	PAYPAL	249	Credit Card Expenses	Fees
2023-01-05	RAND PRINTING	457	Member Mailing Expenses	Paper membership lists
2023-01-07	ENDICIA	15	Office Postage	stamps
2023-01-07	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2023-01-11	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost
2023-01-11	BOA CC 7572	33	Telephone/Fax	800 number
2023-01-11	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2023-01-11	BOA CC 7572	64	Res Publishing Fund Expenses	Purchase of book Secret Language
2023-01-11	BOA CC 7572	64	Res Publishing Fund Expenses	Purchase of book Secret Language
2023-01-11	BOA CC 7572	65	Res Publishing Fund Expenses	Purchase of book Secret Language
2023-01-11	BOA CC 7572	153	Res Publishing Fund Expenses	Purchase of book Secret Language
2023-01-11	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2023-01-11	Federal & State Payroll Taxes	695	Salaries	Employee taxes
2023-01-11	HARRISWB	1736	Salaries	payroll
2023-01-13	ADP	59	Payroll Fees	fees
2023-01-17	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2023-01-23	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost
2023-01-23	BOA CC 7572	20	Internet Access	VULTR.COM
2023-01-23	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2023-01-23	BOA CC 7572	45	Telephone/Fax	800 number
2023-01-25	ENDICIA	15	Office Postage	stamps
2023-01-26	ADP	61	Payroll Fees	fees
2023-01-26	UEA-V	6000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 5470.71 EUR
2023-01-27	DELAWARE, State of	25	Licenses/Permits/Taxes	corp tax
2023-01-31	ESF-V	100	ESF Reg. Payable	Donation from Maria Murphy en 2019 to ESF
2023-01-31	UPS	11	Cost of Catalog Sales	packing materials
2023-01-31	PAYPAL	140	Credit Card Expenses	Fees
2023-01-23	UEA-V	271	Various Payable	Transpago al UEA - NASK 2019
2023-01-24	UEA-V	101	Various Payable	Transpago al UEA - Anonima donaco

De la estraro

Some proposed amendments to the bylaws

Hoss is Editor for E-USA and one of its Directors. Contact him at hoss@lodestone.org.

For decades, Esperanto-USA has divided its savings into three different categories of funds, each following a different set of rules. These categories have enabled us to set aside money for special purposes, allowing donors to have confidence that their contributions won't be used for unrelated expenses.



For example, our General Fund is in the "Unrestricted" category, meaning that the Board has latitude to spend this money for all sorts of expenses. By contrast, the NASKE Fund is in the "Restricted" category, since it is reserved for NASK scholarships only. All spending from the NASKE Fund must be approved by a separate fund administrator (currently Ellen Eddy). The Board still has indirect control over the fund, with the ability to appoint a new administrator, but the layer of indirection offers some protection against indiscriminate spending.

In the most restrictive category are "Capital Funds" like the Ellen Lewis Endowment, which exists only to earn interest for another fund (in this case, the NASKE Fund). By tradition, the Board has resolved never to spend the capital of a Capital Fund.

These traditions have served us well over the years, but they are just that: tradition, with no formal definition and no mention in our Bylaws. For the sake of clarifying these rules to future Boards, as well as making them transparent to the membership, I'd like to finally put them in the Bylaws. Here are the proposed additions: if you'd like to suggest a change before they appear on the ballot you'll be receiving in a month or so, please let me know!

Section XIII – Funds

§1301. Monies controlled by the League shall be assigned to funds in one of three categories: Unrestricted Funds, Restricted Funds, and Capital Funds. The Board may create a Fund by a simple majority vote.

§1302. An Unrestricted Fund shall have a defined purpose, but its monies may be used at the discretion of the Board for any purpose. The Board may dissolve an Unrestricted Fund and assign its monies to another Fund by a simple majority vote.

§1303. A Restricted Fund shall have a defined purpose and a Fund Administrator with discretion over Fund expenditures. Fund Administrators may be appointed or replaced by a two-thirds vote of the Board. The Board may also dissolve a Restricted Fund and assign its monies to another Fund by a two-thirds vote.

§1304. A Capital Fund shall exist only to generate investment income for another Fund. Each Capital Fund shall have a designated recipient Fund to receive investment income. No expenditures may be made from a Capital Fund, but the Board may dissolve it and reassign its monies to another Fund by a unanimous vote.

— Hoss FIROOZNIA, Direktoro

Board Meeting, January 14th, 2023

Ĉeestas: Filipo DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Charlotte BURTON, Fred MEYER III, Jane SHEVSTOV, Hoss FIROOZNIA, Margo KEVESS-COHEN, Timoteo RICE

Ĉeestas sen Voĉdonrajtoj: Vilêjo HARRIS

Meeting called to order. Alex requests that an item for the LK be added to the agenda. It is on the agenda.

Standing Reports

CO

There is a clerical matter that needs to be cleared with Katalin KOVATS. Alex asks about the LK contract. Bill reports there is nothing out of the ordinary and will discuss it more when that item comes up on the agenda. Fred asks

if board members can see the contract. Bill agrees, and the discussion is tabled.

Treasurer

We overspent by \$2500 last year, due to a significant decrease in donations and investments. Bill comments that one difference is that in 2021, Phil sent out a letter requesting donations, and that was not done in 2022. Phil expresses a hope that collaboration with ESF will facilitate the donation process. Jane suggests that it is time to start thinking about a donation campaign. A brief discussion of plans and past successes ensues.

President

Phil reports that he is behind on his work regarding the agenda and expectations for a LK. After that is complete, he intends to work on the board handbook, to expand on the duties of the president. The document regarding the special interest groups is now complete and is in the Google Drive folder that the board shares. Alekso has suggested an expanded vision of what we can do with videos, such as recording LK-j. In the past, this has been done, if at all, by volunteers on their own equipment. Phil recommends this job be included into a budget, to ensure we are paying people for their expertise and efforts, to avoid burnout. Margo has mentioned the use of grants, which Phil supports. Discussion of honorary memberships will ensue. Reminders after today's meetings about tasks and expectations for board members.

Old Business

Report on Addresses and Mailing Lists. Done. Remove from agenda.

LK Programo

Bill needs to sign the contract. There are no concerns, because Raleigh, Chuck Mays, and William Peace University have worked together to make LK-j happen plenty of times. The LKK will suggest a LK budget to the board for approval after the contract is signed. The LKK asks that some board members volunteer to lead sessions at the LK. A discussion arises whether the LK budget or the E-USA budget should cover filming of LK sessions. WPU and E-USA want to know an approximate count of how many people are likely to attend, in order to help figure budgeting and participation costs. It is recommended that we anticipate 70 people and a break-even there or at 60. However, there are also the factors of NASK happening right before the LK, which could support attendance at both. Margo mentions the cost of attendance being prohibitive, including for board members, and looking for a way to solve that. Bill mentions that some groups will send three budgets: average, optimistic, and pessimistic and suggests that 70 might be a good, conservative guest. Margo suggests a LK track targeting NASK-anoj. Charlotte mentions that the LKK would like more workshops. Alekso clarifies the difference between workshops and brainstorming sessions. Discussion arises of the relative

benefit of banquets, dancing, and concerts as kongresso sessions. The board discusses the contract for WPU and the LK.

ESF Communications and Donation Management

ESF suggests that all donations to E-USA go through ESF, which would benefit them by receiving small donations and would benefit us by dealing with legal ramifications around soliciting donations. Chuck and Margo will be discussing this in more detail. The question arises: if someone donates to ESF for us, to a specific fund, does the ESF doubled portion go to the same fund or to our general fund? Another question arises: Can ESF tell us who donates how much, so that we can continue to send out thank you notes?

Board Meeting, February 11th, 2023

Ĉeestas: Filipino DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Charlotte BURTON, Hoss FIROOZNIA, Jane SHEVTSOV, Fred MEYER III, Tim RICE

Ĉeestas sen Voĉdonrajtoj: Vilĉjo HARRIS

A quorum is declared. Charlotte requests that an item be added to the agenda under "New Business" for "LK Budget and Fees." Last month's meeting minutes are not in the usual place, so the approval of those minutes will be pushed to the March meeting.

Standing Reports

Central Office

Nothing to report except a brief bout of Covid slowing down business.

Treasurer

Bill has been providing information to the board about new donations. Reports have been sent in to board members for review.

President

Phil emailed Julie Spickler regarding thank you notes. She still sends thank you notes out and will continue to do so; she has stated that she is also okay with others sending out thank you notes in parallel with her efforts, which could include the board sending personal thank you notes to large donors. The president thanks Bill and Hoss for including in the bulteno a note on the passing of an Esperantisto. Regarding the board's procedures and the organization's procedures, Hoss and others on the board have found evidence of more historical guidelines than the board currently has access to, including a Regularo which described the work of the board and the association, as well as the rights of members. **Action Item: Phil will send emails to Humphrey Tonkin and Duncan Charters**

regarding whether they have access to the Regularo. Hoss has also reached out to David Wolffe about this matter and will report back.

New Business

La estraro diskutu la aŭtoritaton de la estraro laŭ la statuto de EUSA.

The board has been doing so and will continue to do so in Slack. This information should be available in the board handbook for all members. One question that has arisen is “what constitutes an official vote at the Congress?” To what extent is a spontaneous vote during an official congress business meeting binding, and to what extent do we need to send this out for a full membership vote? These issues are currently unclear, such as what amount of discussion and advance warning of such votes should be required. The board is discussing ways to clarify.

Procedure and timetable for finding our next CO Director

This is not an attempt to kick Bill out of office or encourage an early retirement. It is suggested that, whenever Bill decides to retire, we announce 6 months in advance via the newsletter that we are seeking applicants for the position. Likewise, editorship of the newsletter should be announced in advance, and interviews with applicants should occur in the presence of the board, with membership included at every step. These jobs tend to be difficult to fill, but the board expresses an interest in clarifying these procedures to the membership. Bill plans to spend this year creating an online training setup, which would allow interested parties to see what is required in this position, and then in late 2024 or more preferably early 2025, the board can begin announcing and interviewing interested parties, so that they can get more exposure to the job and see if this is something they are prepared to commit to. If an

unexpected event should prevent the current officeholder from doing this job, do we have an emergency plan? One part of that plan is that Bill is making the procedures available and preparing for such an eventuality by granting the board access to needed information.

LK Budget and Fees

The LKK has presented a budget of \$175 base cost for participants of the LK, not counting room and board which are figured separately on a per-person basis. The proposal by the LKK includes 60 participants as a “break-even” number, which would mean that, if we get at least 60 participants, all the fixed costs will be covered, and any additional participants will be bringing in extra money into the budget as well as covering their own costs. This means that, in order to not lose money, we will need 60 participants. These costs compare reasonably to pre-pandemic kongreso costs. The board requests time to look over this budget and will make a vote in Slack beginning no more than 6 days after this board meeting. The board and the Central Office agree that a separate room will not be necessary for the book service and that, instead, the book service can take two hours each day out of the Business Track in order to set up for half an hour, take down for half an hour, and run for 1 hour in between. This will shave an additional \$7-8 off Congress costs. Further, the LKK has recommended that E-USA board expenses be covered by E-USA as an organization, out of the General Fund, and not out of Congress fees as has been done in the past. Further, the board agrees to limit their board meeting on the Friday of the Kongreso to 2-3 hours in the evening, in order to ensure that board members are able to fully participate in NASK on that Friday. This will be possible, as our monthly board meetings via Zoom and our regular participation via Slack can easily ensure that all matters are covered which have historically only been able to occur at the one annual in-person meeting.

Panike

senintenco esperantaĵo • Brandon SOWERS



Brandon sendis la jenan foton el Portugalujo. Ŝajne temas pri liver-aŭto de firmao, kiu vendas bakaĵojn – eble simila al la usona *Panera*, alia firmao kun senintenco Esperanta nomo.

Mikronoveloj

Por nia mikronovelo-rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj – nek pli, nek malpli. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

La dancantoj

Multaj homoj ĉeestas la subĉielan koncerton por ĝui bonajn muzikon kaj veteron. Dum la kantisto kantas faman kanton – “Mi nur estas danda leon’ ...” – kelkaj ĉeestantoj disiĝas por fari spacon: ekdancis juna virino kun maljunulo portanta bastonon. Ili lerte kundancas, memklare ekzercinte sin pri la paŝoj. La vigla maljunulo uzas la bastonon klakdancante, kaj lia kundancanino (ĉu nepino?) elegante piruetas. Kiam la kanto finiĝas, ĉiuj aplaŭdas – la kanton kaj la dancon. La maljunulo kliniĝas al sia partnero, ŝi riverencas lin, kaj ili disiĝas, li al siaj amikoj kaj ŝi al siaj, estante fremduloj kiuj kune dancis nur mallonge sub la suno.



— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

La libroklubanino

Ŝi tagmanĝas sola, romanon enmane, kaŝaŭskultante la konversaciojn de aliaj manĝantoj. Tablopleno da libroklubaninoj babiladas apude – iomete pri libroj (“Mi sekrete amegas amromanojn!”), sed plejparte ne: pri familianoj, aĉetoj, ĉagrenoj.



Ŝi ne ŝatas ilin, ŝi ekkomprenas, kaj daŭre aŭskultas, pripensante kialon. Ili ŝajnas sufiĉe senkulpaj. ... Tamen ili ja parolas iomete tro laŭte, ridas iomete false. Kaj ili vere ne ŝajnas interesiĝi multe pri libroj, ĉu amromanoj aŭ ne.

Eble mi scivolus pri libroklubo, ŝi pensas, sed ne klubo kun tiaj anoj!

Decidiĝinte, ŝi ensakigas sian libron, surtabligas monbiletojn, kaj forlasas la restoracion. Eble ĉe la apuda manĝejo renkontiĝas libroklubo

kaŝaŭskultinda.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

La malbonulo?

Tetrinkante la sekvantan matenon, ŝi maltrankviliĝas. Ĉu ŝi estas malbonulo?




Ŝi zorge konsideras la demandon, rigardante la paserojn flirtantajn eksterfenestre, kaj findecidas: Ne. Ŝi ja kondutis neoptimume, kaj malbonaĵoj okazis, sed erari estas home, ĉu ne? Oni ne ĉagreniĝu tro pri la pasinteco. Cetere, kio okazis ŝajnas nun kiel songo, kvazaŭ iu alia faris tion, ne ŝi. Tamen, unu detalo de la hieraŭaj okazaĵoj ja ĝenas ŝin.

Kion signifas, ŝi scivolas, ke antaŭ ol ekfosi, ŝi zorge skrapis en la kela argilo vicon de ses rektanguloj, ĉiu unu oble du metrojn – kvankam ŝi bezonis enterigi nur unu kadavron? Hm. Pripensinde.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

Kabei aŭ ne kabei

Hodiaŭ mi provis denove. Ne estis pli facile. Ankoraŭfoje miaj duboj kreskas. Ĉu estas tempo konsideri miajn eblojn?



Komence, ĉio estis nova kaj ekscita. Jes, estis fojaj luktoj, sed mi estis certa pri mia decido iri laŭ ĉi tiu vojo. Nun kiam songoj velkis, estas pli kaj pli malfacile antaŭvidi la idealan estontecon. Ĉu estas tempo ŝanĝi direkton?

Je ĉi tiu punkto mi multe investis, esperante, ke ĝi estos realigebla. Se ĝi subite finiĝus, estus truo en mia vivo, kaj tiom da feliĉo mankus. Mi ne volas postlasi ĉion, sed mi ankaŭ timas daŭre iri antaŭen. Ĉu estas tempo kabei?

— Joshua HOLZER <josh.holzer@westminster-mo.edu>

A brief grammar lesson about *ankaŭ*

language corner • Lee MILLER

In Esperanto, the word *ankaŭ* generally goes before the word it modifies.

Notice the difference in these sentences, in which I have bolded some of the words to demonstrate usage and meaning:

Ŝi havas hundon. **Ankaŭ mi** havas hundon.
(*She has a dog. I have a dog as well.*)

Mi amas hundojn. Mi **ankaŭ havas** hundon.
(*I love dogs. I also have a dog.*)

Mi havas katon. Mi havas **ankaŭ hundon**.
(*I have a cat. In addition, I have a dog.*)

Ankaŭ is not used in Esperanto as a transition word at the beginning of a sentence. Where English speakers tend to say *Also, I went to the store, then bought some birdseed*, an Esperanto sentence begins

with *Krom tio ...*, or *Cetere ...*, or *Ne nur tio, sed ...*, etc.

Ankaŭ at the end of a sentence is pretty ambiguous. Again, English speakers love to put *also* at the end. But Esperanto speakers expect something to follow *ankaŭ*. If you're a new Esperanto learner, I'd encourage you to not put *ankaŭ* at the end of a sentence.



Lee MILLER

Liĉjo is a member of the *Akademio de Esperanto*, an expert Esperanto instructor, and he has administered the *Duolingo Esperanto Learners* Facebook group since its inception in 2015.

<licxjo@gmail.com>

Kolofono

Redaktoro/Editor: HOSS FIROOZNIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitaĵajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.eo>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.

La ekesto de artefaritaj artistoj

scienco • Timothy BORONCZYK



“Bauhaus style dog house.” (de Midjourney)

Artefaritaj intelektoj (AI) kiel DALL-E, Midjourney, kaj Stable Diffusion, kiuj kreas bildojn el teksto, ricevas multe da atento lastatempe pro siaj kapabloj krei unikajn kaj belegajn artaĵojn. Tamen la atento ne estas tute pozitiva. Multaj homoj timas pri la rezultoj de la teknologio, precipe, ke ĝi ŝtelos laboron de homaj artistoj. Estas ankaŭ diversaj etikaj, juraj, kaj sociaj zorgoj. Tiuj estas gravaj, ĉar la teknologio pliboniĝas rapide, kaj ĝia akcepto fariĝas pli kaj pli vasta.

Kiel funkcias programoj por fari bildojn el teksto?

La celo estas krei bildojn surbaze de tekstaj priskriboj, ekzemple, “duetaĝa rozkolora domo kun blanka barilo”. La programoj dependas de speciale trejnitaj AI-modeloj por kompreni la priskribojn. Esence, la modeloj estas kreitaj per granda kvanto da datumoj, per kiuj ili agordas reton de interligitaj nodoj. La nodoj agas kiel filtriloj, rekonante specifajn trajtojn. Kun sufiĉe da tempo, datumoj, kaj bonŝanco, modelo konverĝas al formo kapabla doni la celitajn rezultojn.

Imagu, ke vi volas filtri akvon por purigi ĝin. Vi povas uzi serion de filtriloj, ĉiu kun malsama grandeco aŭ formo, por kapti diversajn specojn de etaj malpuraĵoj. Kiam akvo trapasas la filtrilojn, pli kaj pli da malpuraĵoj estas forigitaj, ĝis restas nur pura akvo. Tiel funkcias bild-kreiloj kiel Stable Diffusion. Oni trejnas la modelon per sufiĉe da datumo por ke ĝi kapable rekonu specifajn trajtojn, ekzemple de

hundo, kato, domo, arbo, ktp. Poste oni prezentas al la modelo bildon de hazarda signalo (“blanka bruo”) kaj uzante tekstan priskribon, ĝi provas elfiltri ĉion, kio ne konformas al la priskribo.

Artistoj maltrankviliĝas

Ofta timo estas, ke pli vasta uzo de artefaritaj bildoj rezultos en malpli da laboro por homaj artistoj. Estas ankaŭ timoj, ke oni uzos AI-programojn por krei bildojn laŭ la stilo de konataj artistoj, endanĝerigante ties intelektan proprion. Ekzemple, en la retejo Lexica.art, kiu registras pli ol 10 milionojn da bildoj faritaj per Stable Diffusion, aperas 93 000 faritaj el priskriboj kun la vortoj “style of Greg Rutkowski” por imiti artiston konatan pro siaj fantaziaj verkoj.

Cetere, estas zorgoj pri privateco kaj pri regado de datumoj, kiujn oni uzis por trejni la AI-modelojn. Iuj artistoj malkontentas, ke la trejnado uzis iliajn verkojn senpermeso, prenita ekzemple el sociaj komunikiloj. La baza modelo de Stable Diffusion estis trejnita per la datumaro LAION-5B, kiu konsistas el kvin miliardoj da bild-tekst-



“Sketch of astronaut by da Vinci with text.” (de Midjourney)

paroj kolektitaj el Interreto. Sendependa analizo de la datumoj malkovris, ke proksimume 47% el la bildoj venis de nur 100 interretaj domajnoj, el kiu la plejmulto (8.5%) venis el Pinterest, kun malpli el WordPress, Blogspot, Flickr, DeviantArt, kaj Wikimedia Commons. Ni scias tion ĉar StableDiffusion estas malfermitkoda projekto. Kontraste, DALL-E kaj Midjourney estas fermitaj, do la publiko ne precize scias, kiujn datumojn ili uzis.

Mi intence ne traktas la uzon de AI-modeloj por krei t.n. “deepfakes”, realismajn falsaĵojn. La teknologio por krei ilin estas jam facile havebla en aliaj iloj kiel Photoshop, kiuj estas eĉ pli facile uzeblaj. Tiaj falsaĵoj estas longdaŭra problemo en multaj industrioj, sed ne pro tiu ĉi teknologio.

Malfacilaĵoj kaj limigoj

Unu el la plej gravaj problemoj por tekst-al-bildaj sistemoj estas la alta kosto de trejnado, kiu postulas multege da komputila povo kaj memoro. Kvankam Stable Diffusion povas krei bildojn pli-malpli rapide per ordinara, surtabla komputilo, la modelo bezonis 150 000 horojn da laborado de specialaj grafikaj procesoroj (Nvidia A100), je tuta kosto de 600 000 USD.

Eblas ankaŭ “troadapti” modelojn dum trejnado; tio okazas kiam oni trejnas per tro specifa datumaro, kaj la modelo ne povas sukcese ĝeneraligi tion, kion ĝi lernis. La rezulto estas malbona rendimento kaj malaltkvalitaj bildoj.



“Oil painting of a plate of beets in the style of van gogh.”
(de BlueWillow)

Bona trejnado bezonas ankaŭ altkvalitajn datumojn. Okazos problemoj, se la datumoj ne bone reprezentas la diversecon de tio, kion ĝi devas rekoni aŭ filtri. Ekzemple, se oni trejnas modelon por rekoni homojn, sed uzas plejparte bildojn de nur blankuloj, la modelo ne povos rekoni nek krei bildojn de aliaj etnoj. Same, se en la bildoj aperas ĉefe virinoj, kiuj konformas al nur unu normo de beleco, ankaŭ la rezultoj sekvos la saman normon. Tia mistrejnado povas enradikigi


stereotipojn.

Alia limigo: la kreitaj bildoj dependas entute de tekst-priskriboj, kaj estas malfacile elpensi priskribon por krei ĝuste la deziratan bildon. Miaj plej sukcesaj provoj kun tiuj programoj okazas per mallongaj kaj simplaj priskriboj. Estas mirinde, kion la programo kapablas krei per minimuma enigigo. Sed kiam mi volas bildon de io specifa, estas tre defie gvidi la modelon al ĝi.

Cetere, eĉ kiam mi sukcese ricevas bildon unuavide akcepteblan, pli atenta rigardo montras, ke ankoraŭ restas elementoj ne tute ĝustaj. Ekzemple, mano eble havus ses fingrojn. Aŭ nazo malhavas naztruojn. Necesas interveno de artisto por havi bonan bildon, kaj tio limigas la utilon de tiaj sistemoj. Ili plej utilas nur por tiuj, kiuj bone scias, kiel verki priskribojn kaj volas dediĉi tempon al la afero. Ĝenerale, ne eblas iri rekte de koncepto al rezulto tiel facile, kiel asertas la propagandistoj. Por ĉiu bela majstraĵo afiŝita en Interreto, ekzistas centoj da aĉaĵoj forĵetitaj.

Konkludo

La teknologio por krei bildojn el tekstaj priskriboj prezentas novajn eblojn por artistoj, donante al ili kapablon krei novajn formojn de arto kaj aŭtomatigi diversajn aspektojn de artfarado. Ĝi povus ankaŭ konduki nin al novaj specoj de kunlaborado inter homoj kaj maŝinoj. Sed la teknologio estas ankoraŭ en siaj fruaj tagoj, kaj jam leviĝas multaj etikaj, juraj kaj sociaj zorgoj. Estas grave, ke ni traktu tiujn zorgojn serioze, ĉar la teknologio daŭre pliboniĝos kaj fariĝos pli vaste uzata.



Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas unu el la direktoroj de Esperanto-USA, estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel

programisto.

<tboronczyk@gmail.com>

La tradukdefioj revenas!

traduku! • HOSS FIROOZANIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj kaj komentoj.

Post longa paŭzo finfine revenas la tradukdefioj! Hura! (Ĉu hurai, aŭ ĉu vei?) Jam temp' estis por akriigi vian kraĵonon, surmeti la okulvitrojn, senpolvigi tiun neglektitan ekzempleron de PIV, kaj cerbumi!

Por la unua defio de 2023, ni proponas koncizigitan fragmenton el la klasika, distopia romano *The Handmaid's Tale* de Margaret ATWOOD. La jena teksto venas el la kvara ĉapitro:

I walk along the gravel path that divides the back lawn, neatly, like a hair parting. It has rained during the night; the grass to either side is damp, the air humid. Here and there are worms, evidence of the fertility of the soil, caught by the sun, half dead; flexible and pink, like lips.

I open the white picket gate and continue, past the front lawns and towards the front gate. In the driveway, one of the Guardians assigned to our household is washing the car.

The car is an expensive one, a Whirlwind; better than the Chariot, much better than the chunky,

practical Behemoth. It's black, of course, the color of prestige or a hearse, and long and sleek. The driver is going over it with a chamois, lovingly. This at least hasn't changed, the way men caress good cars.

He's wearing the uniform of the Guardians, but his cap is tilted at a jaunty angle and his sleeves are rolled to the elbow, showing his forearms, tanned but with a stipple of dark hairs. He has a cigarette stuck in the corner of his mouth, which shows that he too has something he can trade on the black market.

He lives here, in the household, over the garage. Low status: he hasn't been issued a woman, not even one. He doesn't rate: some defect, lack of connections. But he acts as if he doesn't know this, or care. He's too casual, he's not servile enough. It may be stupidity, but I don't think so. Smells fishy, they used to say; or, I smell a rat. Misfit as odor. Despite myself, I think of how he might smell. Not fish or decaying rat; tanned skin, moist in the sun, filmed with smoke. I sigh, inhaling.

La redakcio (trovu ĝian adreson en la kolofono) akceptos vian proponon **ĝis la 15-a de Majo**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ ne volas. Sed ĉiuokaze bonvolu sendi **nur unu proponon**, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

Celadon

senintenca esperantaĵo • Greg KIRCHMAIER



Leganto Greg KIRCHMAIER afable sendis la jenan foton de butikon en Santa Barbara, Kalifornio, kie oni vendas porhejmajn meblojn. Ŝajne Greg rezistis la celadon de la vendisto al lia monujo: li nur preterpasis la butikon, kaj ne eniris.